**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

Aktiva neŭtraleco
estas kaj restas
la principo de UEA

Fortikigu UEA-on!

Subtenu la novan
ESTRARON de UEA

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 28/1974 8 aŭg 1974
Aperas ĉiusemajne

## Nova estraro de Universala Esperanto-Asocio

Hamburgo (pp) La Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974 en Hamburgo, fariĝis turnopunkto por la Esperanto-movado; kun ĝi komenciĝas nova periodo!

La komitato de UEA elektis novan estraron kaj novan prezidanton. En la kongresa kunsido ferma, sabate, 3 aŭg, d-ro Werner Bormann, prezidanto de LKK, prezentis la novan prezidanton de UEA, D-ron Humphrey Tonkin, per jena parolado:

"Nia Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo nun alproksimiĝas al sia fino. Ni havis dum tiu ĉi semajno en Hamburgo iom pli da pluvo kaj da grizaj nuboj ol ni supozis antaŭe. Tio rilatas la eksteran veteron sed ankaŭ la interna klimato ne montris la kutiman sungajan brilecon. Kiu povas pli bedaŭri tion ol la Loka Kongresa Komitato kiu deziris forte ke rekompence al sia laboro la kongresanoj ĉiuj forveturu kun agrablaj memoroj.

Sed la suno brilas nun! Eĉ nia kongresa fotisto kiu atendis tutan semajnon ke la suno venu por bela fotiĝo povis fari la foton. Ankaŭ en nia movado komenciĝas nun periodo en kiu konataj agantoj ekprenas la fadenon de la senĉesa laborado por la internacia lingvo Esperanto kaj ili dediĉas freŝan laborforton al tiu ĉi movado. Mi kiel nun ankoraŭ plufunkcianta membro de la kongresa prezidantaro kaj kiel prezidanto de la LKK esperas, ke la en Hamburgo komenciĝanta nova laborperiodo estu en siaj sukcesoj kompareblaj kun tiuj de la antaŭa periodo.

La nova estraro pretas, la nova prezidanto ekprenis sian seĝon. D-ro Humphrey Tonkin estis ĉi tie de la komitato kun grandega plimulto elektita prezidanto de UEA. Li estas iama prezidanto de TEJO kaj aktiva tra la jaroj en multaj Esperanto-aferoj. Li estas en si mem internacia kiel anglo loĝanta en Usono kie li laboras en universitata medio kiel vicprovosto pri subdiplomaj studoj kaj vicprofesoro pri anglaj lingvo kaj literaturo en la universitato de Pensilvanio en Usono.

Mi petas la novan prezidanton ke li nun transprenu la gvidon de tiu ĉi ferma kunsido de la 59a Universala Kongreso de Esperanto."

Sekvis forta aplaŭdo. Al la vortoj de d-ro Bormann aldonindas, ke Humphrey Tonkin estas 34jara kaj honora prezidanto de TEJO.

### La aliaj estraranoj

D-ro Tonkin en la plua daŭro de la kunsido prezentis la aliajn novajn estraranojn de UEA dirante jenajn enkondukajn vortojn:"Mia unua tre feliĉa tasko estas prezenti al vi la novan estraron de UEA. Ni estas kompletaj ĉi tie kun escepto de unu homo kiu devis tuj foriri je la fino de la kongreso ne atendinte esti alelektita ĉi tie kaj do ne povis ŝanĝi siajn planojn.(Temis pri d-ro Paul Denoël, Liego! Red.) Sed ĉiujn sep homojn mi al vi ĉiukaze prezentas."

Vicprezidantoj de UEA

D-ro Carl Støp - Bowitz, Oslo, Norvegio, profesoro en la universitato de Oslo, doktoro pri zoologio, prezidanto de la Norvega Esperantista Ligo, vicprezidanto de Scienca Esperanto-Asocio, membro de la Akademio de Esperanto, ĉefkunlaborinto pri zoologiaj demandoj en PIV, prezidanto de Someraj Universitataj Kursoj (SUK).

Taskoj: Respondeca pri faka agado, speciale pri plifortigo de SUK.

D-ro Werner Bormann, Hamburgo, ekonomiisto, registara direktoro, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio kaj de la LKK de 59a UK, instrukomisiito pri Esperanto en la universitato de Hamburgo. Li apartenis jam al la antaŭa estraro de UEA dum tri jaroj.

Taskoj:Respondeca ĉefe pri landa agado, landaj asocioj kaj similaj rimedoj.

La aliaj estraranoj de UEA

S-ro E.L.M. Wensing, Nederlando, esperantistiĝo en 1930, aktiva kiel Cseh-instruisto, re-aktiviĝo antaŭ deko da jaroj, fondinto de EKI (Instituto de Esperanto por Komerco kaj Industrio), vicprezidanto de UEA de 1962 - 1972.

Taskoj: Respondeca pri diskonigo de la agado de UEA interne de la movado, pri administrado kaj komerco kaj industrio.

D-ro Paul Denoël, Lieĝo, Belgio, kuracisto, de multaj jaroj aktiva gvidanto en la Belga Esperanto-Federacio.

Taskoj: Estrarano pri specialaj agadoj. Li dediĉos siajn fortojn kaj tempon al reunuigo de la fortoj en UEA.

S-ro S. Świstak, Pollando, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, gajninto de la pokalo "Lapenna" en Sofio 1963, esperantisto dum dudeko da jaroj.

Taskoj: Respondeca pri Turismo kaj ekstera informado, kunligo de la diversaj informaj fakoj en diversaj landojkaj similaj tiaj agadoj.

D-rino F. Felsö-Szabo, Hungario, advokato, prezidantino de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ek de 1966 aktiva en la studenta Esperanto-movado, la unua virino en la estraro de UEA (?).

Taskoj: Respondeca pri kongresoj kaj konferencoj

S-ro E.W. Woessink, Nederlando, laŭ profesio impostoficisto, ĝenerala direktoro de kontrevizoraj oficejoj en nederlanda provinco, okaza juĝisto en sekcio de supera tribunalo. Komitatano de UEA de 1959, estrarano pri financoj de 1960.

Taskoj: Respondeca denove pri financoj. Pri lia tasko la prezidanto diris laŭvorte: "Do li havas iusence la plej malfacilan taskon el ni ĉiuj en la tuja estonteco."

Pri siaj taskoj en la estraro de UEA la nova prezidanto Tonkin diris: "Mi mem transprenis respondecon ĉefe pri eksteraj rilatoj, kie mi laboros ĉefe per komisiono pri eksteraj rilatoj, kiun ĵus starigis la komitato, pri kulturo, pri kontaktoj kun la komitato, pri la laborplano."

**********

Dankon al la LKK

Pilo-Press esprimas dankon kaj rekonon al la Loka Kongresa Komitato (LKK) Hamburgo kaj al ĉiuj ĝiaj multnombraj kunlaborantoj, kiuj de matene ĝis nokte dejoris en la giĉetoj por la bonfarto de la kongresanoj kaj de la kongreso!

## Pri la estonta agado de UEA

### Parolado de la nova UEA-prezidanto

Hamburgo(end). Post la prezento de la unuopaj estraranoj kaj mencio de la taskoj disdividitaj la nova UEA-prezidanto d-ro Humphrey Tonkin direktis al la kongresanoj jenan paroladon:

"Nun mi transiras al kelkaj vortoj pri la estonta agado de nia asocio kaj mia kompreno por tiu agado kiam temas pri mia prezidanteco. Mi volas mencii du partojn de la agado:
1) la internan strukturon de la asocio kaj
2) la diversajn kampojn en kiuj nia asocio laboras.

Precipe pri la dua parto de tio kion mi diros mi konsiliĝis kun la diversaj estraranoj kaj do la vortoj kiujn mi eldiros ĉi tie estos diritaj nome de la tuta estraro. Laŭ mia opinio,kaj tion mi jam diris al la komitato, la unua ĉefa punkto de nia agado en tuja estonteco dividiĝas en tri subpunktoj:
Unue kaj nepre unue:sanigo de la financoj de la asocio;
Due: pliefikigo de la administrado de la asocio;
Trie: pli efika organizado de niaj diversaj homaj laborfortoj en la movado
kaj al tiuj tri internaj agadoj, internaj taskoj, mi intencas dediĉi la pli grandan parton de mia tempo kaj ankaŭ la estraranoj aliaj intencas dediĉi sian tempon al tiuj internaj demandoj en la unua periodo.

### Malbona financa situacio

Kiam temas pri financoj,kiel jam diris al vi s-ro Wensing, la situacio estas tre malbona. En la pasinta jaro la asocio havis grandan deficiton kaj estas granda ebleco ke ĝi estas pli granda en la nuna jaro. Ni ne povas atendi por resaniĝo, ĉar ni ne havas tiun tempon. La nun tasko nia estas ordigi nian administradon financan tiel ke ni povas fari bonajn juĝojn pri ŝparoj, pri vastigo de fontoj pri monaj rimedoj. Mi povus veni al vi nun kun iu apelacio pri la bezono de ankoraŭ pli grandaj donacoj viaflanke. Sed tion mi ne faras. Mi tion ne faras ĉar la sperto al mi montris - ĉu temas pri mi mem, ĉu temas pri aliaj -, ke organizon kiu ne ĝuste regas sian propran administradon, kiu ne ĉiujn problemojn havas sub la manoj, tiun asocion ne subtenos la homoj. Kaj pravas tiuj homoj. Unue ni devos montri al vi ke ni scias administri, ke ni scias sanigi la financojn kaj poste ni devos peti vian helpon. Verŝajne do okazos iu financa kampanjo por resanigi nin. Sed en la unua stadio estas ni, kiuj devas montri al vi ke ni scias kiel entute tion organizi. Do, mi nun ne apelacias al vi tiumaniere, mi petas al vi daŭrigi vian subtenon al nia asocio, daŭrigi vian subtenon ĉu finance ĉu morale kaj poste ni venos al vi denove kun verŝajne pli grandaj petoj kiujn vi tiam verŝajne ankaŭ estos pretaj akcepti kaj plenumi. Por helpi en la financa agado la komitato formis specialan financan komisionon, kiu eklaboros tuj post la kongreso, do estas tuta grupo da homoj kiuj okupiĝos pri diversaj flankoj de la financaj demandoj de nia organizo. Mi esperas, ke tio fakte helpos konduki al solvoj de niaj problemoj.

### Koncepto pri la estrara laboro

Kiam temas pri la maniero laŭ kiu mi konceptas la laboron de la estraro necesas unu vorto aŭ du diri. Kion mi jam diris al la Komitato, ŝajnas al mi iasence ni fariĝis tro rigidaj en niaj pensoj koncerne la laborfortojn de nia organizo. La estraro ne devus esti la organo kiu devus plenumi la laboron de la asocio, almenaŭ ne en tiel simpla formo. Nia estraro estas aro de gvidantoj kiuj gvidas

la laboron sed ne necese ĝin mem plenumas. Do ili bezonas helpon, ili devas ricevi tiun helpon unuavice de la Komitato, kiu elektis ĝin kaj esprimis al ĝi fidon kaj duavice de la membraro ĝenerala de la asocio. Se nia afero entute sukcesos, se nia asocio sukcesos, tio dependas de la kunlaboro de ni ĉiuj, ne de parto de ni sed de ĉiuj el ni. Do, la funkcio de la Komitato ne estas simple kontroli la funkcion de la estraro, kvankam tio estas komprenebIe laŭ la statuta bezono, ne nur kontroli sed ankaŭ fariĝi parto de tiu ekipo. Same ankaŭ la membraro ĝenerala devas kunlabori en tiu agado. Sub mia gvido en la tuja estonteco la estraro faros specialajn klopdojn kunligi sin kun la Komitato, aktivigi la komitaton kaj aktivigi ankaŭ la membraron. Kaj per ĉiuj rimedoj ni klopodos fari tion, ĉefe per diversaj laborgrupoj kiuj mem estas en stato de formiĝo, t.n. komisionoj, kelkaj el kiuj estis jam fonditaj dum ĉi tiu kongreso en la komitata kunsido ĉi-matene.

Senprecedencaj okazintaĵoj

Ni ĉiuj travivis dum la pasintaj kelkaj tagoj okazintaĵojn preskaŭ senprecedencajn en la Esperanto-movado. Ili estis por ni ĉiuj ŝokaj eventoj, traŭmaj eventoj. Oni povus per longaj paroladoj remaĉi tiujn okazintaĵojn, sed per tio oni verŝajne falus en sterilan diskuton sen feliĉa eliro. Oni devas turni sin al la estonteco.

Vortoj pri la estonteco

Mi turnas min al la estonteco kun sento de bedaŭro en tiu senco ke pluraj niaj honoj forlasis niajn rangojn. Sed mi kuraĝas diri ke tiuj homoj forlasis niajn rangojn nur portempe kaj ke tiuj homoj revenos al niaj rangoj, kaj ke ni intertempe antaŭenigu nian laboron laŭ tiu sama spirito kiun kvazaŭ fondis kaj kiun subtenis tiuj niaj antaŭuloj. (Aplaŭdo!) Kaj nun kelkaj vortoj pri ĝuste la estonteco, pri la diversaj limoj de agado de nia asocio. Unuavice mi persone kaj la aliaj estraranoj estas komplete konvinkitaj kiel montris tiu rezolucio kiun akceptis la komitato ĉi-matene, ke neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia asocio. (Aplaŭdo!)
Ni dediĉos specialan atenton al tiuj internaj demandoj kiujn mi jam menciis, sed specialan atenton ankaŭ al informado, por krei pli vastan , pli efikan reton, al kongresoj kaj konferencoj, al universitata agado diversflanka kaj ankaŭ esplorado pri Esperanto kaj la lingvoproblemo. Specialan atenton ni ankaŭ dediĉos al Esperanto-kulturo, ne nur la plifortigo de nia propra kulturo en niaj propraj rangoj sed ankaŭ la plifortigo de la reputacio de la Esperanto-kulturo ekster niaj rondoj, kampo, kiu estas en la nuna tempo apenaŭ plugata. Ni dediĉos specialan atenton al landaj asocioj kaj landa agado ĝenerale, do la rilatoj kun landaj asocioj, la fondigo de novaj kaj agado en landoj sen landaj asocioj, atenton speciale al eksteraj rilatoj kaj al tiuj kampoj kiuj jam donis al ni grandajn rikoltojn de sukceso, kaj ankaŭ en aliaj kampoj ĝis nun ne tiom atentataj. Ni klopodos per niaj fortoj igi la asocion, nian asocion, UEA, modelon de internacia agado per Esperanto kaj ni klopodos ke ankaŭ nia estraro kaj nia komitato estos modelo al la cetera membraro.
Unu finan vorton mi diru al vi: Mi transprenis la prezidantecon en cirkonstancoj por nia movado malfacilaj. Mi tion faris ĉar mi havis almenaŭ tiom da kuraĝo sed se entute ni ĉiuj povos havi sufiĉan kuraĝon por antaŭenigi nian aferon kaj prosperigi nian asocion, ni ne povos sola; labori. Mi ĉi tie petas al vi ĉiuj kaj per ĉi tiuj vortoj al la tuta Esperanto-movado reunuiĝi, runuigi niajn fortojn por la batalo kiu staras antaŭ ni.(Aplaŭdo!) Mi dankas pro tiu esprimo, mi esperas ke ĝi per si mem montras al ni vojon antaŭen!"

Noto: Pilo-Press dankas al Andrzej Pettyn, redaktoro de Pola Radio, kiu disponigis kaseton laŭ kiu estas farita la 28a numero de PP!